# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO


**N° 205 JUNIO 2000**

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sume: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE POUR L'ESPERANTO

*** *Sankta* PIO X-*a, preĝu por ni* ***

Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM



BASILIQUE Ste CLOTILDE

Expéditeur/: Ass. Cath. Française pour l'espéranto
*Sendinto* 9, rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR

**Motif de non distribution**

- ☐ Adresse insuffisante
- ☐ N'habite pas à l'adresse
- ☐ Refusé
- ☐ Autres

Périodique Semi-routé

**PORT PAYE**

COLMAR (68)

## Sommaire/*Enhavo*


| | Pages/*Paĝoj* |
|---|---|
| Le mot du président-*La bileto de la prezidanto* | 3 |
| Prière - *Preĝo* | 5 |
| *Baziliko Sankta Klotilda* | 6 |
| *Protokolo* | 8 |
| *En nia Asocio (J.Vincent)* | 10 |
| Kalendaro | 11 |
| 53-a IKUE Kongreso Rimini-Romo | 12 |
| Anoncoj | 13 |
| Abonnements - *Kotiztabelo* | 15 |


**ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO**

## Surkovrile

Baziliko de Sankta-Klotilda en Reims, kiun mi vizitis dum la bapto de Adrien, mia baptofilo.
(Red.)

L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio nepre antaŭ la 20.a de septembro 2000. Venonta bulteno aperos fine de septembro.

Finpresado la 07/07/2000

**_FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO_**

**Nro 205 Junio 2000**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )

CCP : 2 324 93 N Rouen

Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C.St-Saëns
76000 ROUEN
Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS
Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON
Religia Konsilanto :
P-ro L.BOURDON
7,Av. Salomon
59800 LILLE
Peranto IKUE:
S-ro M.COLLEU
95,Rue Victor Hugo
80440 BOVES
Redakcio :
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Rete 100623.3022@Compuserve.com

# Le Mot du Président

Ainsi que vous le lirez sur une autre page du bulletin, notre association a procédé à de nouvelles élections pour combler deux postes vacants au sein de son comité Directeur.

Le P. Bourdon , qui était notre conseiller ecclésiastique depuis de nombreuses années, a demandé à être déchargé de ses fonctions. Espérantiste convaincu, plein d'allant et de vivacité, il aura marqué notre association de son empreinte et laissera à chacun d'entre nous le souvenir d'un homme au coeur généreux ouvert aux problèmes du Monde actuel. Nous le remerçions bien sincèrement pour l'action éminente qu'il a menée pour répandre l'espéranto dans les milieux catholiques.

Il a été remplacé par le P. Héroux que nous connaissons tous et qui sera,nous en sommes sûrs, son digne successeur.

M.Roger Despiney , en raison de son état de santé, a dû être aussi remplacé. Discret, toujours afable et souriant, il a participé pendant longtemps à nos congrès et à nos réunions de bureau. De bon conseil, doué d'une foi profonde et réfléchie, il a été d'une grande aide pour la gestion et le développement de notre association. Nous lui disons merci de tout coeur.

Son successeur est M. Daniel Chevalier, cheminot retraité. Beaucoup ont déjà apprécié ses qualités de sérieux et de dévouement. Il sera précieux au sein de notre Comité.

Mais nous devons aussi prendre conscience que ces changements ne sont que les prémices de nouvelles mutations parmi les membres de notre Comité. En 2001 nous aurons encore un ou deux postes vacants à pourvoir, afin d'assurer le renouvellement et le rajeunissement de vos dirigents.

C'est dire que chacun de nous doit s'interroger sur son devoir d'aider l'association à progresser et donc envisager de se porter candidat à un poste de membre du Comité Directeur. D'ores et déjà j'attends vos candidatutres.

# La Bileto de la Prezidanto

Kiel vi tion legos sur alia paĝo, nia asocio plenumis novan elekton por plenigi du vakantajn postenojn en la Komitato.

Pastro Bourdon,kiu estis nia eklezia konsilanto depost multnombraj jaroj petis ĉesi sian oficon. Konvinkita esperantisto,tutplena je vigleco kaj viveco,li sendube ŝtampis nian asocion kaj lasos al ni ĉiuj la memoron de nobla kora homo malfermita al la problemoj de la moderna Mondo. Ni tutsincere dankas lin pro la eminenta agado, kiun li faris por disvastigi esperanton en la katolikaj medioj.

Li estis anstataŭita de Pastro Héroux, kiun ni ĉiuj konas; tiu ĉi estos lia inda posteulo.

S-ron Roger Despiney ,pro sia malforta sanstato,oni ankaŭ devis anstataŭigi . Diskreta, ĉiam afabla kaj ridetanta, li longtempe partoprenis en niaj kongresoj kaj niaj komitatkunvenoj. Saĝa nestoro,dotita de profonda kaj pripensata fido, li multe helpis en la direktado kaj disvolviĝo de nia asocio. Al li ni tutkore dankas.

Lia posteulo estas S-ro Daniel Chevalier, emerita fervojisto. Multaj jam estimis liajn ecojn de seriozeco kaj sindonemo . Li estos altapreza en nia Komitato.

Sed ni ankaŭ devas konscii, ke tiaj ŝanĝoj estas nur la antaŭsignoj de novaj ŝanĝoj ĉe la komitatanoj . En 2001 ni ankaŭ devos doni postenon al unu aŭ du novaj kandidatoj por garantii la renovigon kaj maljunigon de niaj estraranoj.

Tio signifas, ke ĉiu el ni devas interogi sin mem pri sia devo por helpi la asocion progresi kaj do projekti kandidatiĝi por fariĝi komitatano. Ekde nun mi atendas viajn kandidatiĝojn.



## DONU VIAN GRACON

Sinjoro kaj Majstro de mia vivo, forigu de mi la emon al senfareco, senkuraĝiĝo, supereco kaj vanaj paroloj.
Sed donu al mi spiriton de sendifekteco,
humileco,pacienco kaj amo.
Donu vian gracon al mi, via servanto.
Jes Sinjoro-Reĝo, permesu, ke mi vidu miajn kulpojn
kaj ne prijuĝu mian fratojn,

Ĉar Vi estas benata en la jarcentoj de jarcentoj.
Amen

Efrem la Siriano (306-373)

## SALUTON JOZEFO

Saluton,Josefo, justa homo,
virga edzo de Maria kaj
davida patro de la Mesio.
Benata estas vi inter la homoj,
kaj benata estas la filo de Dio
al vi konfidita : Jesuo.



Sankta Josefo,patrono de la
universala Eklezio, gardu
niajn familiojn en la paco
kaj en la dia graco kaj helpu
al ni en la horo de nia morto.Amen

(Memoru ke Pio la 9a, deklaris Sanktan Jozefon universala patrono de la Eklezio.Tiu Papo estos beatproklamita la 3-an de septembro 2000)

(El Katolika Sento 2/2000)

# Baziliko Sankta-Klotilda -(Reims)


En 1896,oni festis la 14-an jarcenton de la bapto de Klodvigo (Clovis) .Dum tiu okazo la ĉefepiskopo de Reims, Kardinalo Langénieux, decidis la konstruadon de baziliko dediĉita al Sankta-Klotilda, edzino de Klodvido, instigantino de la konvertiĝo de la reĝo,kaj ankaù dank'al tio de la tuta lando Francio.

La Kardinalo deziris ke tiu nova preĝejo estos la baziliko de ĉiuj santkuloj de Francio. Li petis al ĉiuj diocezoj. Venis donace mono,relikvoj de Sanktuloj ,kiujn stampis la historio de Francio, deponitaj en la kripto: 120 relikvujoj, 1650 relikvoj ... kaj ŝtono de la vojo de Jerusalemo (apud la statuo de Santka-Anna)

La arkitekto de Reims,Alphonse Gosset, miris la bizancajn preĝejojn, precipe tiu de Santka Sofia en Konstantinopolo . En tiu stilo li konstruis la bazilikon Sankta Klotilda , en formo de greka kruco, kun kupolo en la centro, cirkaùita de kvar mez-kupoloj. Kontraùe, la orientado estas okcidente por esti vidalvide al la portalo de la baziliko "St-Remy".

Kiel orientaj preĝejoj, ĝi devis esti ornamita komplete de mozaikoj. Nur la kupolo estis farita .(En la centro Kristo kiu benas cirkaù li la francajn santktulojn, kiujn havas preĝejon en la urbo. La vitralo en la fondo montras la bapton de "St Remy" . La aliaj vitraloj montras multajn sanktulojn de la donacantaj diocezoj. La Kalvario estis pentrita sur kupraj ladoj de la loka artisto Auger. La predik-katedro estas en pirenea marmoro, kiu reprezentas Klodvigo katekizita de "Saint Vaast" (ĉefverko de Gosset 1930).





# Protokolo de la ĝenerala kunveno en Parizo la 6-an de majo 2000

La kunveno okazis en la konvento Sta Jacobo la 6an de majo 2000. Prezidis S-ro Bessière.

F-to Marmou,S-roj Colleu kaj Despiney salutis la ĉeestantaron perletere.


En agadraporton aprobis 25 membroj; la financan raporton aprobis 24 membroj, unu sindetenis.

En la baloto por la renovigo de unu triono de la komitato voĉdonis 25 anoj. La kandidatoj ricevis la sekvantajn voĉojn kaj estis ĉiuj elektitaj aŭ reelektitaj.

| | | | |
|---|---|---|---|
| S-ro Bessière | 25 | S-ro Basso | 25 |
| S-ro Chevalier | 25 | Pastro Héroux | 25 |

La venonta ĝenerala kunveno okazos dum la kongeso en Lisieux dum majo 2001.







# Protokolo de la Komitatkunveno de la 6-an de Majo 2000 en Parizo

Ĉeestis :S-ro Bessière,P°Héroux,F-inoj Chaney kaj Michel,S-roj Chevallier,Pons kaj Villeneuve.

Petis senkulpigon:S-roj Basso Colleu, Despiney

Post la baloto ,P° Héroux anstataùigas Pastron Bourdon, kiel religia konsilanto, S-ro Chevalier anstatamùigas s-ron Despiney.

La Komitato preparis la pilgrimon al Lisieux dum majo 2001; la precizan daton oni fiksos post kelkaj monatoj. P° Girault el Poitiers prelegos pri Sankta Tereza kaj la tuttaga ekskurso kondukos la partoprenantoj al la palaco St Germain du Livet kaj al Honfleur.

La reklamo pri nia asocio en Franca Esperantisto bone sukcesis; ni denove reklamos en januaro kaj februaro 2001.

S-ro Pons detale raportis pri sia agado por la eldono kaj disdonado de la eta biblio "Dio parolas al siaj infanoj". La afero estas tre kontentiga kaj trafis sian celon.

La venonta komitatkunveno okazos en Parizo la merkredon la 25an de oktobro 2000.

# EN NIA ASOCIO

## FORPASO de Jeannine Vincent (1922-2000)

La 22-an de aprilo 2000 Dio alvokis al si S-inon Jeannine VINCENT en Baugé (Maine et Loire),la vilaĝo kie ŝi loĝis de sia emeritiĝo en 1977,dediĉante sin al la apuda Kastelo Grésillon. Akirinte kiel la unua virino la Diplomon pri Altaj E-Studoj de Franca E-Instituto, ŝi iĝis ties kasisto kaj rolis dum trideko da jaroj kiel ĝia vera gvidanto. Ŝi servis ankaŭ kiel ĝenerala sekretario, poste vicprezidanto de UFE. Ŝi gvidis multajn kursojn,ĉefe al infanoj .Delegito kaj pedagogia fakdelegito de UEA ekde 1983 . Ŝi tradukis novelojn de Villiers de l'Isle-Adam kaj la romanon "La verda radio" de J.Verne (1995).
Ŝi estis dumviva membro de IKUE.
**Ŝi estis nia kasistino kaj redaktorino de nia bulteno dum 28 jaroj (de 1968 al 1996) .**
Elstaranta esperantistino, ŝi arde laboris por nia lingvo, kiun ŝi majstre scipovis kaj praktikis.
Ŝi postlasas en niaj koroj malĝojon kaj ĉagrenon.
Dio donu al ŝi pacan ripozon .



## KIAL PREGEJOJ NOMIĜAS "DOMO DE DIO"

Dio domon ne bezonas. Nur por ni preĝejoj nomiĝas "domoj de Dio". En la homa koro lokas maltrankvilo: de kie ni kelkfoje sentas nin kiel "fremdulojn kaj gastojn surterajn" . Por ke Dio kapablu siahejme akcepti nin estas "domoj de Dio". Preĝi signifas esti liaj invititaj, esti de Kristo akceptitaj. La evangelioj al ni rakontas kiagrade Jesuo feliĉis, kiam homoj venis kun li pasigi iun momenton. Al ili li parolis,ilin aŭskultis,ilin sanigis.
Estas preĝejoj, por ke ni ne forgesu, ke ankaŭ hodiaŭ Kristo akceptas nin.

En la psalmoj la "domo de Dio" estas la jerusalema templo. La fideluloj ne lacigas dirante je kiagrado ili amas lin : "Io,kion mi petas de l'Sinjoro: loĝi en la domo de l'Sinjoro ĉiutage dum mia vivo " (Ps27,4) "kiel dezireblas viaj loĝejoj(...),feliĉas tiuj,kiuj loĝas viadome" (Ps84,2k5).

La 23a psalmo montras ,ke la pilgrimoj por tien iri fariĝis simbolo de l'irado de la homa ekzistado. Kaj la alvenoj al la Templo,la festoj, kiuj tie celebratis, signifis, ke la vivo ne iradas nenien. Vojfine Dio akceptas siadone. Ni ne ekzakte scias, kiel disvolviĝis. Sendube okazis preĝoj, kantoj,manĝoj; pastroj alvortis

kuraĝigdirojn .
Ĉiaokaze la fideluloj konkrete spertis pri la akcepto dia: "Antaù mi vi pretigas tablon (...), per sanktoleado mian kapon vi parfumas, mia pokalo superfluas "(Ps2",5).Entemple naskiĝas certo, ke Dio neniam foras , eĉ ne morthore. "Mia koro ĝojegas kaj mia animo jubileas, jes,mia korpo sekurece ripozas. Ĉar vi ne povas lasi mian animon infere nek vian amikon korupton vidi" (Ps16,9-10).

Kristo konstruis sanktejon "kiun homa mano ne faris" (Mk14,58 k Jo2,19-21). Nun "la domo de Dio estas ni " (Hb3,6). Loĝitaj de l'Sankta Spirito ni povas preĝi ie ajn. "Tie, kie du aù tri mianome kunas, mi estas meze de ili", diris Jesuo (Mt18,20). La kristanoj tamen ne rezignis pri konstruado de "domoj de Dio", preĝejoj. Ĉar ni ĉiam bezonas signojn. Preĝejen eniri helpas nin por kompreni, ke Kristo daùre atendas nin. Preĝi signifas reveni domen, reveni Patrodomen.

## KIAL APARTENI AL LA EKLEZIO, SE SIAN AMON DIO AL ĈIUJ DONAS ?

Je kio utilas aparteni al la Eklezio, ĉar Dio faras nenian diferencon inter la homoj kaj "levigas sian sunon sur la malbonuloj kaj sur la bonuloj"(Mt5,45) ? De antaù nelonge estas substrekite, ke ne la Eklezion sed la Mondon Dio repacigas kun si (2Ko5,19).



Li estas "la Savanto de ĉiuj homoj" (ltm4,10). Tial pli urĝas la demando: kial ne tutsimple kredi je la senfina Diamo, kial eniri la eklezian kunecon ?

La eklezia vivo malhelpas nin malprecize kaj malcerte konceptigi la amon dian. La enpreĝeja anonco de l'Evangelio kaj la bapto certigas la akceptemon kaj la pardonemon far Dio. Dum la celebrado de la Eùkaristio la prezenco de Kristo konkretiĝas per senseblaj elementoj . La dia amo sensibliĝas en la bonvolemo, la reciproka zorgemo kaj la solidaro inter kredantoj, ĉar tiuj realaĵoj Dion entenas. "Se ni nin reciproke amas, Dio restas en ni, en ni lia amo efektiviĝas" (1Jo4,12). Apartenante al la Eklezio mi ne bezonas provi konvinki min, ke Dio amas min . Aliaj diras tion al mi kaj tion sentigas al mi .

Sed ĉu ni ne povas preskaù same sperti ekster-eklezie ? La reciprokaj amo kaj zorgemo ekzistas en aliaj aroj aù asocioj . Ilin renkonti povas doni saman senton esti akceptita kaj serioze akceptita. Eĉ kelkfoje pli malfacilas trovi malŝpareman akcepton en la Eklezio ol en aliaj organizoj . Kial do fari tiun klopodon ?

Eklezio malanstataù eblas, ĉar ĝi estigas projekton, kiu entenas kaj historion kaj universon (Ep3,10-11). La celo de tiu projekto,

kiu ankaù nomiĝas "alianco" , konsistas en la kuneco de Dio kun ties kreitaĵoj kaj la kuneco de ĉiuj homoj inter ili. En iu ajn grupo ĉiu povas sperti, ke bonas kunesti kaj aparteni al sama komunumo. Sed Eklezio partoprenigas min en realaĵo mondampleksa. Tiu elekto por servi la projekton de Dio per apartemo al la Eklezio povas postuli rezignojn .Sed ĉu tiuj rezignoj tiel timindas , kiam, dank'al tiu elekto, iu espero por la tuta homfamilio estas al ni konfidita ?

(Tradukis el Letero de Taizé :Pastro Degrelle)

*LA VENONTA EUROPA JUNULARA RENKONTIĜO OKAZOS en HISPANIO*
*-BARCELONA -*
*de la 28-a de decembro al 1-a de januaro 2001*

RENCONTRE EUROPÉENNE DE JEUNES
28 décembre · 1er janvier
taizé
2000/2001
Barcelone



# KALENDARO

## 2000

| | |
|---|---|
| 15/07 ĝis 22/07 | SEBRANICE (Ĉehio) apud Litomysl<br>19-a IKUE E-Tendaro.<br>Ĉiu tendara tago komenciĝos per esperantlingva Sankta Meso en tendara frateca kaj amikeca etoso. Venu travivi en ĉarma naturo belan semajnon en la Jaro de la Granda Jubileo .<br>Detalaj informoj kaj aliĝiloj estas haveblaj ĉe : IKUE-Katolika Sekcio Trsicka ul.6 CZ-751 27 PENCICE . |
| 25/07 ĝis 01/08 | TEL-AVIVO (Israelo)<br>85-a Universala Kongreso de Esperanto<br>http://ourworld.compuserve.com/homepages/profcon/m_uk85.html |
| 05/08 ĝis 12/08 | HONGKONGO (Ĉinio)<br>56-a Internacia Junulara Kongreso |
| 10/08 ĝis 14/08 kaj de | VENECIO (Italio)<br>JUNULARA MONDA TAGO 2000<br>Grupo Esperanto: respondeculo Paola Ambrosetto<br>retadreso: esperantovenezia@libero.it |

15/08 gîs 20/08 — ROMO (Italio)
JUNULARA MONDA TAGO 2000
(adreso: same kiel Venecio)
(Francaj gejunuloj povas peti subvencioj ĉe la redaktoro)
Fine de Junio :Neniu Petis !!!

13/08 gîs 20/08 — TAIZE (Francio)
4-a Junulara Ekumena Esperanto Tendaro (JET)
rete: http://www.taize.fr
aliĝu ĉe:
Bernard Eichkorn, Romaùsring 20
D-78050 VILLINGEN Germanio
rete: Bernhard.Eichkorn@esperanto.de

02/09 ĝis 07/09 — RIMINI-ROMO ( Italio)
53-a Kongreso de IKUE
Jubilea Pilgrimo

**2001** — **STRASBOURG (Francio)**
Julio — 57-a Internacia Junulara Kongreso
Ĉu nia asocio povus prepari specialan diservon ,
ĉu vi havas ideojn ?

21-28 Julio — ZAGREBO (Kroatio)
86-a Universala Kongreso



**53-a Kongreso de IKUE**
**(Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)**
**Jubilea Pilgrimo RIMINI**
**/San Giuliano Mare 2-8.09.2000**
**Temo: Konvertiĝo kaj Sakramentoj.**

**Sabaton la 2an de septembro**
-alveno
19.30 Vespermanĝo
20.45 Rozario fronte al la paroka preĝejo

**Dimanĉon la 3an de septembro- La Bapto**
08.30 Oficiala komenco de la IKUE-jubilea pilgrimo - matenaj preĝoj - Laùdoj.
09.00 Prelego pri "La konvertiĝo"
11.00 Sankta Meso
12.30 Tagmanĝo kaj libera tempo. Ebleco viziti la ekspozicion pri la Mortotuko.
15.00 Movadaj kunsidoj
19.30 Vespermanĝo
21.00 Prelego pri la Mortotuko

**Lundon la 4an de septembro -La konfirmacio**
Pilgrimo al ASIZO -GUBBIO -LA VERNA (reveno al Rimini antaù la nokto-mezo)

**Mardon la 5an de septembro -Konfeso kaj Geedziĝo.**
Libera tempo ĝis tagm
13.00 Pilgrimo al LORETO kuncelebro de Sankta Meso -Vizito

**Merkredon la 6an de septembro - Episkopa kaj pastra Ordinoj**
04.00 Forveturo al ROMO -partopreno en la papa ĝenerala aùdienco, Jubileaj Bazilikoj.


**Jaùdon la 7an de septembro - La Eùkaristio**

07.30 Matenmanĝo
08.30 Matenaj preĝoj - Laùdoj - Prelego pri la Eùkaristio.
11.00 Sankta Maso laù grek-katolika rito
12.30 Tagmanĝo - Libera tempo
19.30 Vespermanĝo
20.45 Rozario fronte al la paroka preĝejo.

**Vendredon la 8an de septembro - La Sanktoleado**

07.30 Matenmanĝo
08.30 Vizito de la centro de Rimini:katedralo,Sankta Meso
aù: post la vizito de la Katedralo,pilgrimo al Corvignano,Krucvojo, Meso en la Pilgrimloko de la Virgulino de la Gracoj.
Fermo de la kongreso
12.30 Tagmanĝo. Forveturoj.

Informoj: CENTRA OFICEJO DE IKUE
Via Di Porta Fabbrica, 15
I-00165 ROMA RM ( Italio)
Tel/Fax : 00.39.06632839



# IKUE RETE

Ekekzistas retpaĝaro de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista IKUE ĉe la adreso :
**www.ikue.org**
Ĝi estas la adreso kiu kondukas al la paĝoj realigitaj de Attila Szep (Hungario) .Baldaù ekfunkcios la retadreso : ikue@ikue.org.
Oni decidis realigi tion,unue por oficiala ĉeesto de IKUE en la reto, por "savi" nian nomon (fakte jam ekzistas en la reto ikue.net ,kiu estas tute alia afero ol nia movado), due por disponigi pli facile memoreblan adreson.

C. Sarandrea

## Kotiztabelo 2000

| | | Frankoj | Euroj |
|---|---|---|---|
| I.K.U.E kun "Espero Katolika" | | 164 | 25,00 |
| Peranto : S-ro M. COLLEU<br>95,Rue Victor Hugo 80440 BOVES<br>P.ĉ.k 10 621 81 P LILLE . | | | |
| A.C.F.E kun "Franca Katolika E-isto | unuopulo : | 60 | 9,15 |
| | geedza paro : | 80 | 12,20 |
| | gejunuloj ĝis 25jara, pastro,religiu(in)o : | 30 | 4,57 |
| | bonfaranto : | 200 | 30,50 |

Pagu al: Ass.Cathol.Franc.Esperanto CCP ROUEN 2.324.93.N

Dépot légal : 2ème trimestre 2000 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE Directeur délégué: Michel BASSO